# La nova vizaĝo de Budapeŝto



Katolika preĝejo sur la Placo de l' Rozoj

*El Esperanto korespondado, el poŝtkartoj, el diversaj prospektoj — sed ĉefe de eksterlandaj vizitantoj — la malnova Budapeŝto estas konata en la tuta mondo.*

*Poetoj, muzikistoj verkis kantojn pri la beleco de la hungara ĉefurbo. Amikoj, gastoj, kiuj vidis Budapeŝton antaŭ dekses jaroj, aŭ eĉ pli frue, memoras,*



Kat. preĝejo sur la Batthyány placo

*kian pitoreskan ĉirkaŭajon donacis la naturo al nia ĉefurbo. La proksima montaro donas vintre blankan, en aliaj sezonoj verdan fonon al la urbo.*

*Sed mi nun deziras prezenti al niaj amikoj, al niaj legantoj la n o v a n v i z a ĝ o n de nia malnova Budapeŝto.*

*La malnova vizaĝo de nia ĉefurbo ricevis kruelajn vundojn de la faŝistoj, kiujn vundojn ni kuracis per amo kaj fideleco, per fervora laboro. Kiu ne vidis la vundojn, eĉ ne konjektas, kiom da laboro, kiom da*

Kat. preĝejo sur la Martinelli placo





*Ni promenadas*



*Ni promenadas plu*

*oferemo estis bezonata, por ke jam staru la novaj domoj sur la ruinoj, ke super la majeste ondruliĝanta rivero denove kurbiĝu la kvin nove konstruitaj pontoj, kiujn la faŝistoj en 1944 eksplodigis. Nun konstruiĝas la sesa, la Elizabet-ponto, kiu estis la plej gracia elinter la malnovaj pontoj.*

*Kiel fieraj belulinoj, sin rigardas en la arĝenta spegulo de la Danubo vicoj de novaj, elegantaj konstruaĵoj. Vespere, kiel brilantaj diamantvicoj respeguliĝas en akvo de la Danubo la modernaj neonlampoj.*

*Jen, unu el la novaj trajtoj sur la malnova vizaĝo de Budapeŝto.*

*La impona konstruaĵo de la parlamento estas la malnova, jam sesdekkvin jara. La vundoj, kaŭzitaj de la milito sur ĝi ne estas jam videblaj, do ŝajnas, ke nenio ŝanĝiĝis sur ĝi. Tamen ne kredu tion. Rigardu supren, sur la ĉefan kupolon de tiu ĉi — en ŝtono esprimita — poemo!*

*Jes, tie staras firme kaj signifoplene la kvinpinta ruĝa stelo! Ĝi pruvas kaj anoncas la politikan, socian kaj ideologian ŝanĝiĝon, kiu okazis ne nur en la ĉefurbo, sed en la tuta lando! Sub tiu ĉi ruĝa stelo kreis la novan hungaran konstitucion la delegitoj de la laboristoj, kamparanoj kaj progresemaj inteligentuloj. Sub tiu ĉi stelo faras la leĝojn la delegitoj de la hungara laboranta popolo por krei socialistan sociordon.*


*Jen, tiu ĉi ankaŭ estas nova trajto sur la malnova vizaĝo de Budapeŝto!*

*En nia ĉefurbo en pli ol 50 preĝejoj estas kolektitaj diversaj artobjektoj religiaj, reprezentantaj parton de la kelkcentjara hungara kulturo. Sed ekstere, ĉirkaŭ kaj sur la ŝtupoj de tiuj imponaj arĥitekturkreaĵoj staris, sidis vintre kaj somere la invalidoj, maljunuloj, mizeruloj kaj ili laŭte plendis, ĝemis, ploregis kaj petegis por helpo, petegis por moneroj. Sur la stratanguloj de la eleganta mezurbo almozpetegis blinduloj...*

*Kaj nun ĉi tiuj viktimoj de la pasinta sociordo — malaperis!*

*La maljunaj gelaboristoj ricevas pension kaj ili jam ne estas superfluaj ŝarĝoj por siaj infanoj. Se ili malsaniĝas, ankaŭ ili ricevas senpage kuraciston, medikamenton kaj malsanulejon. Kiuj ne havas familion, tiuj vivas bonzorgite en urbaj socialaj hejmoj. La blinduloj lernas metion kaj ili disponas je propra fabriko, kiun ili direktas kaj kie ili bone salajrite laboras. Ne estas ofendita ilia homa digno per almozpetado, sed ili sentas sin egalrajtaj kaj egalvaloraj membroj de la socio.*

*Ni tagmanĝas, ni devas lavi la manojn*





*Ni ludas kaj ridas*



*Ni ŝatas ludi en la sablo*

*Sed sur la stratoj kaj placoj de Budapeŝto aperis tute novaj koloroj de nia vivo. Ĉiutage oni povas vidi sur la stratoj kaj placoj promenantajn, ludantajn infan-trupetojn, kiuj konsistas el 30—40 geknabetoj, kvar-kvin jaraĝaj, elegante, egalforme vestitaj sub gardado de edukistinoj. Ili estas infanoj de gelaboristoj de iu institucio, ministerio, entrepreno ktp., en kies domo estas la „dumtaga vartejo" por la etuloj. Ili restadas tie dum la gepatroj laboras, kaj posttagmeze je la kvina horo la gepatroj kune kun siaj infanoj iras hejmen. Ĉiu „dumtaga vartejo" havas sian apartan vestaĵkoloron por vintro kaj por somero. Posttagmeze la infanojn oni vestas en ilian propran vestaĵon kaj tiel ili iras hejmen.*

*Ne nur etulojn, sed ankaŭ pli aĝajn geknabojn oni renkontas preskaŭ ĉiutage sur la stratoj sub gvidado de pedagogoj, rigardantaj la karakterizajn vidindaĵojn de la granda urbo. Ili estas provincaj infanoj, kiuj veturis grupe al Budapeŝto, konatiĝi kun la rimarkindaĵoj de la ĉefurbo.*



*Ni kantas belege*

*Jen ĉi tio estas ankaŭ n o v a t r a j t o sur la malnova vizaĝo de Budapeŝto.*

*Plimultiĝis la grandaj, elegantaj bazaroj, magazenoj, teksaĵo-, ŝuo- kaj aliaj vendejoj, kiuj ĉiam estas plenplenaj de aĉetantoj. — En la pasinto la gelaboruloj malofte povis aĉeti eĉ la plej bezonatajn aĵojn, pro tio estis kutimo, ke la komercistoj staris ĉe la enirejo kaj afable invitis la preterpasantojn por aĉeti. — La diversaj higienaj nutraĵ-vendejoj plenaj je varoj kaj aĉetantoj parolas por si mem. Montras altan vivnivelon. La loĝantaro estas bone salaj-*



Ni faris ekskurseton

*rata, la varoj abundas. El tio sekvas, ke ankaŭ la kulturnivelo konstante leviĝas ĉe ni. La riĉe prizorgataj librovendejoj konstante havas aĉetantojn. La kunlaborantoj de la bibliotekoj estas superŝutataj per libro-petoj de la legantaro.*

*Pli ol 30 novaj teatroj, scenejoj, preskaŭ cent kinejoj — ĉiam plenplenaj — amuzas, instruas la loĝantaron de la ĉefurbo.*

*Ankaŭ ĉi tiuj estas n o v a j t r a j t o j sur la malnova vizaĝo de Budapeŝto.*

*Antaŭ dekses jaroj en la eksteraj distriktoj — kie okupis lokon la fabrikoj — loĝis senescepte malriĉaj homoj: laboristoj, etoficistoj, etnegocistoj, mizeruloj, senlaboruloj ktp. La domoj estis — grandparte — malnovaj, kadukaj, la stratoj malpuraj, la aero fumoplena kaj malbonodora.*

*Nun tio preskaŭ malaperis. La urbo etendiĝis. En la ĉirkaŭaĵo leviĝas centoj da novaj, 4—5-etaĝaj, modernaj domoj. Inter ili parkoj, la larĝajn stratojn ornamas arboj kaj floroj. Lernejoj, infanvartejoj, vendejoj, magazenoj, dispensarioj ktp. Ĉio, kio estas bezonata por socialista, moderna urboparto, estas trovebla ĉi tie. Kaj tie, jam ne malbonodorigas la aeron la fumo de fabrikoj. De tempo al tempo la fabrikojn oni translokigas provincen, kaj — kie nur tio eblas — en la fabrikoj kaj uzinoj oni uzas oleon kaj elektron — kiuj ne fumas.*

*Ĉi ĉiuj ankaŭ apartenas al la n o v a t r a j t o de la malnova vizaĝo de Budapeŝto.*

*Kaj fine: sur la suda parto de monto Gerhardo — leviĝanta apud la Danubo — altiĝas grandioza Liberec-Monumento en formo de beltalia, fiere staranta virino. Ŝi rigardas en la malproksimon, en tiun direkton, de kie venis la liberiganta Ruĝa Armeo. Ŝi alten levas ambaŭ brakojn tenantajn per ili palmobranĉon por transdoni ĝin al la herooj, kiuj forpelis la faŝistojn el Hungarlando kaj redonis la liberecon kaj sendependecon al la hungara popolo.*

*Jen, vidu! Ĉi tio estas entute n o v a v i z a ĝ o de la hungara ĉerfurbo.*

*Konkordano*



Ni ŝatas ankaŭ la Margaret-insulon